

Novaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

MEMORE AL JUI ĈUUNOŜIN

S-ro Jui Ĉuunoŝin (1894-10-11 ĝis 1967-11-12) estas esperantisto, loĝinta en Jokohamo de 1966, kaj klopodis starigi nian rondon. Sed lia memoro ĉe ni estas speciala, ĉar en la fino de lia vivo, li mortigis sin bruligante antaŭ la Ĉefministra Rezidejo en Tokio, proteste al la planata vizito de siatempa japana ĉefministro Satoo Eisaku al Usono, kiu bombardis la Nordan Vjetnamion. Omaĝe al ni, ni planas havi 2 eventojn ĉi-aŭtune.

Hama-Ronda Vespero pri Jui

*la 15a de novembro, 17h00-19h00, ĉambro 710 de la regula kunsidejo


Inter alie, s-ro Doi Hirokaz retrospektive parolos pri la jaro 1967.

Vizito al la tombo de Jui

*la 23a de novembro, ĉe Tombejo Kamakura Reien

Ni kune iros per buso je 14h01 de la Stacio Kanazawa-Hakkei de la linio Keikyuu, kaj celos la tombejon. Oni kolektiĝu ĉe la bushaltejo antaŭ la stacio je 13h45.

s-ro Jui, kiel naciŝava heroo en Vjetnamio (el ekspozicio en Pac-Muzeo en Hoĉimin-Urbo)



ZAMENHOF-FESTO DE KANAGAWA, 2014

*la 14a de decembro, 13h00-16h30, en la Tikyuu Simin Kanagawa Plaza (etaĝo 5)

La 4 rondoj en la gubernio Kanagawa komune havas Zamenhof-Feston, kaj ĉi-jare nia rondo prizorgos ĝin.

Ĉi-jare, krom la kutimaj programeroj, okazos prelego kaj deklamado pri Vasilij Eroŝenko, rusa blinda poeto-esperantisto, kiu vivis en Japanio, verkis kaj Esperante kaj japane. La venonta jaro 2015 markos la 125 jarojn de lia naskiĝo, kaj tial oni omaĝe havos tiun ĉi tempon. (Vidu la artikolon en p.4.)

- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

96a Legokunsido

En la 6-a de septembro okazis legokunsido kun 5 personoj. La titolo de la legita libro estas “Krokize de mia ĝardeno” de István Nemere.

Superba tekniko en la noveletoj de Nemere

Aida Yayoi

“Krokize de mia ĝardeno” estas nur 58-paĝa libro konsistanta el 19 noveletoj, temas pri variaj aferoj. Oni povos ĝui la diversecon de la libro, kvankam ne ĉiuj rakontoj estas altiraj: iuj estas iom embarasaj kompreni la esencon, iuj ne tiel elvokas intereson daŭre legi. Sed entute la libro, kiel mikronovelaro, estas tre fascina pro gustoj de beletro, plus distra literaturo. Tio dependas de la superba skribkapablo de Nemere, fekunda kaj ambicia verkisto de Hungario. Ĉi tie en lerte aranĝitaj scenoj aŭ situacioj li reliefigas misteron de homoj simbole, fantazie kaj simpatie per simplaj sed trafaj frazoj kaj minimumaj vortoj. Tiu tekniko estas vere admirinda. Ŝajnas al mi, ke liaj verkistaj okuloj ne preterlasas temon fikcii fruktan legaĵon unu post alia en la facila kaj malpeza stilo.

Miaj favorataj rakontoj el la 19 mikronovelaro---

La domo: Temas pri terura insisto de paroj plenumi celon por celo fine elĉerpita.

La helpisto: Kun naiva etoso esprimiĝas la unua renkonto de du tegmentistoj, oldulo kaj novico. Malparolema sed varmkora metiisteco estas impresa.

La fatala amanto: En la tuta verkaro la plej amuza distraĵo pri cirkulado de malvirto.



Aperas viro “malfacile pensanta, sed en amorpraktikoj tre sperta”.

La kokido: La morto de kokido, “Pasiono” kaj “Aŭŝcwitz” aludas koncepton de absurdo de la vivo. Tio esprimiĝas en la fabela etoso de kamparo.

La sanktulo: Rakonto pri falsa sanktulo fuĝanta de la polico. Kontraste interesaj estas facile trompitaj vilaĝanoj al tiu malbona sed senzorga sanktulo.

Hamaronda lego-grupo jam legis 6 librojn de Nemere. Kronologie ili estas: Dum vi estas kun ni (1994), Nesto de viperoj (1997), Amparolo (1998), La fermita urbo (2001), Krias la silento (2003), Serĉu, kaj vi trovos (2006). Estas plaĉe aldoni al ili la sepan libron 8 jarojn poste.

Mi neniam renkontis s-ron Nemere, sed lian eksan edzinon mi renkontis tri-foje. En tiuj la plej impresa estis la dua renkonto en Toruno, Pollando en 1995. Ŝi vizitis neatendite nian hotelon kaj parolis pri Esperanto al niaj karavananoj neesperantistaj. Ili kun granda intereso aŭskultis ŝin per mia traduko. Tiun nokton kun kelkaj volontuloj mi kaj mia edzo promenis laŭ la lumigita strato gvidate de la bela, svelta sinjorino. Tio restas ĉe mi kiel ne forgesbla memoro.

Krokize de mia ĝardeno

Mizro Iwaya

La nomo de István Nemere estas fama inter literaturamantoj. Sed ni ofte vidas longajn romanojn liajn kaj noveletoj ne ofte troviĝas en lia verkaro. Tiu ĉi libro estas kolekto de liaj 19 mallongaj noveletoj plejparte 2-4 paĝojn longaj. Kvankam ili estas mallongaj, ĉiuj havas sian historion kaj frapfinaĵon. Ĉi tie mi vidas lian talenton de verkado. Li posedas tiom da provizoj de novelaj semoj. Se necesas, li povus verki eble 19 librojn kiuj abundas pli ol 100 paĝojn.

La enhavo de la libro ofte temas pri kampara vivo. Paca atmosfero regas tie, sed

io eksterordinara okazas tie kaj disvolviĝas la historio. Mi kredas ke la aŭtoro loĝas en granda urbo, kiel Budapeŝto ekzemple, kaj kampara vivo aspektas al li ekzotika kaj idilia. Do okazas nur eta konfuzo kaj stabiliĝas en paco. Kelkaj diras ke tia tendenco apartenas al maljunulo. Do tiu ĉi estas la libro por maljunuloj. Sed, malgraŭ tio, ekzistas ankaŭ tre modernaj kaj stimulaĵoj.

La mallongeco permesas al ni legi laŭplaĉe ie kaj iam ajn. Do la libro estas rekomendinda por ĉiuj literaturamantoj kaj esperanto-lernantoj. Ĝi ne perfidos vian atendon.

Miniaturaj Vivoturnoj

Sibayama Zyun'iti

Mi imagis el la kovrilpaĝa desegno kaj la titolo “Krokize de mia ĝardeno”, ke la libro enhavas rakontojn pri privata vivo ermita, sed tiel ne estis. István Nemere verkis aŭ SF-ece, aŭ soci-romanece, kaj tia etoso plenas en la libro enhavanta 19 rakontojn, ĉiu en 2- aŭ 4-paĝaj.

“La Ĝardeno” estas “mi-rakonto”, rakontita de “mi” pri la ĝardeno de “mia patro”, sed kia fakte estas propra “mia ĝardeno”? La leginto ja miru pri la fino. En “La subtegmentejo”, la priskribita persono malfacile supreniras al, aŭ subvenas de la subtegmentejo, sed ĉu tiu ĉi ne falas planken de ŝtuparo? Tiaj estas iel hejmecaj rakontoj. Estas aliaj rakontoj ŝajne pri la ordinara vivo --- de hungaroj!

En “La Helpisto”, oni ankoraŭ laboras post la unua ptm-e, kaj tagmanĝas post la dua. Tian temposkemon ni nun ne faras, sed estis tiel, kiam mi kaj mia edzino vizitis Hungaron en 1980-aj jaroj. Tiam iu esperantisto regalis nin per koko tiutage vivinta en sia korto. Tiun ĉi epizodon memorigis tia rakonto.

Min tamen plej impresis rakonto-duo, “La Drako” kaj “La inferulo”. La unua rakontas tragedion en metroa stacio, kaj la dua, kvankam ne estas rekta interrilato inter la homoj aperantaj, rakontas la originon de la tragedio.



Prezento pri projekto “Eroŝenko 125”

MURATA Kazuyo

1) Vasilij Eroŝenko (1890~1952) naskita en Ukrainio

Li fariĝis blinda kiam li estis ankoraŭ 4-jaraĝa, sed lia patro edukis lin tute same kiel ordinaran infanon. Kaj li lernis en lernejo por blindulo dum 9 jaroj. Feliĉe s-ino Anna Ŝarapova instruis al li Esperanton kiam li estis 16-jaraĝa kaj rekomendis studi en Anglujo. Li sola vojaĝis ĝis Londono helpe de survojaj esperantistoj.

Li havis grandan talenton je muziko kaj lingvo, ludis violonon kaj balalajkon.

Li vizitis Japanion por lerni masaĝon en 1914. Li loĝis en Tokio kaj konatiĝis kun multaj esperantistoj kaj intelektuloj. Ĝis tiam en Japanio troviĝis esperantistoj, sed ili preskaŭ ne havis ŝancon paroli kun eksterlandaj esperantistoj. Pro tio li faris grandan rolon propagandi Esperanton en diversaj lokoj kaj okazoj. Dume li instruis Esperanton ene de la blindula lernejo, rezulte naskiĝis blindaj esperantistoj.

Krome li verkis multajn rakontojn eĉ en la japana lingvo, ili estas tre unikaj. Dum lia esperantista vivo 46 jara, li verkis ĉirkaŭ 70 verkaĵojn, inter ili troviĝas aŭ esperante aŭ japane aŭ ruse (malmultaj) skribitaj verkoj.

La japane skribitaj rakontoj estas ĉ.30 kaj inter ili 17 estas ankoraŭ ne esperantigitaj. Jam de antaŭ 10 jaroj, el samideanoj de Ukrainio venis tradukpeto. Kiel konate s-ro Takasugi Ichirou estis la plej eminenta je Eroŝenko, sed bedaŭrinde forpasis en la jaro 2008.

S-ro Mine Yositaka ankaŭ estas profunda studanto pri Eroŝenko. Sed li estas malsana kaj ne povas okupiĝi pri tradukado.

2) Projekto “Eroŝenko 125”

Tiu ĉi jaro estas la 100-jara jubileo, post kiam Eroŝenko venis al Japanio. Kaj venonta jaro estos 125a datreveno de lia naskiĝjaro. Estos bonŝanco, rememorante pri li, ni faru tradukadon aŭ okazigu prelegkursidon aŭ fakkursidon en la Japana Esperanto-Kongreso (JEK) en Sendai.

Tre feliĉe en 2010 okaze de la kunveno de lia 120 datreveno, s-ro Hikita Akio komencis esti esperantisto. Li estis ekslernejestro de blindula

lernejo, kie antaŭlonge ankaŭ Eroŝenko lernis. Kaj li kaj s-ino Isaki Miĉiko kaj mi kune planas la projekton, kiu enhavas sekvajn aferojn:

a) Traduk-teamo

Inter 17 rakontoj troviĝas 6 jam tradukitaj en la rusan aŭ ukrainan lingvojn. Kaj 5 estas esperantigitaj per la membro de Jokohama Salono (Unu el la lernoklasoj).

Do restas 6 rakontoj, kiuj estas dezirataj laŭeble frua tradukado. Ni planas fintraduki kaj eldoni ilin.

b) Legkunveno de lia verkaĵo okaze de fakkunsido en JEK ĉi-jara (2014)

c) Preleg-kunsido

En la venonta jaro ni okazigu prelegkursidon kaj ekspozicion por ke resciigu lian kontribuon al nunaj esperantistoj kaj blindulaj mondoj.

ĉ) Fakkunsido en JEK de Sendai en 2015

Se ni povos inviti iun, ekzemple filino de s-ro Takasugi, kiu akompanis la patron kiam li vizitis la tombon de Eroŝenko, ni povos aŭskulti interesan rakonton.

d) Festkunveno en la 23a de decembro 2015 en la restoracio de Nakamura-ya. Kiam Eroŝenko suferis, ges-roj Souma (Fondintoj de la kompanio) subtenis lian vivon.

Kiel konate troviĝas en ĝi la fama pentraĵo, kopio de portreto de Eroŝenko kiu ricevis la premion de ŝtata trezoro.

e) Volontula Teamo, kiu entajpos liajn fabelojn ekzemple en “librejo Sakura”, ĉar en Japanio la eldonado de la libroj de Eroŝenko estas jam ĉesigitaj, krom “Selektitaj Verkoj de Eroŝenko” eldonitaj de Japana Esperanta Librokooperativo.

Pro tio oni ne havas ŝancon enmanigi liajn librojn, ni deziras enmeti ilin en la komputilo. Kaj dume ni planas enmeti esperantan rakonton por ke, tutmondaj esperantistoj povas legi lian verkaĵon.

3) Elsendlisto “Eroŝenko 125” ekis

S-ro Hikita komencis retliston sur la Google-group. Danke al tio la nombro de la membro pli kaj pli multiĝas. Se vi ŝatas membriĝi en ĝi, bonvole anoncu vin al mi, mi petas.